

*Sveda*

*Poemaro*



# *Sveda Poemaro*

Tradukis:

MAGDA CARLSSON

STOCKHOLM

---

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

1954  
Hugo Löjdquist Tryckeri, Tierp

# LISTO DE ENHAVO

	Paĝo	
<i>Johan Olof Wallin</i> (1779—1839)	Amikon karan . . . . . 9	
	Kristnaska mateno . . . . . 10	
	En la Ĉielira tago . . . . . 12	
	El "Anĝelo de l' Morto" . . . . 13	
<i>Esaias Tegnér</i> (1782—1846)	Tio, kio eternas . . . . . 17	
<i>Johan Ludvig Runeberg</i> (1804—1877)	Himno . . . . . 19	
	<i>Lina Sandell-Berg</i> (1832—1903)	Tagon nur, momenton nur .. 20
	Sekureco . . . . . 21	
	Trankvilas ĉe Jesua kor' . . . . 22	
<i>Carl David af Wirsén</i> (1842—1912)	Sankta Vendredo . . . . . 23	
<i>Selma Sundelius-Lagerström</i> (1859—1927)	Sinjoro, blovu ventoj de l' Spirito . . . . . 24	
	<i>Verner von Heidenstam</i> (1859—1940)	La nokto . . . . . 25
<i>Gustaf Fröding</i> (1860—1911)	Kio estas vero? . . . . . 27	
	Sigelo de Salomono . . . . . 28	
	Idealismo kaj realismo . . . . . 30	
	Maja kanteto . . . . . 31	
	Al Salem . . . . . 32	
	Elekto — aflikto . . . . . 34	
<i>Oscar Levertin</i> (1862—1906)	Novjara kanteto mezepoka .. 36	
	En la juda tombejo de Praha 38	
	Sonĝo pri tero kaj ventoj .. 39	
	La mortintoj . . . . . 42	
	El "La gepatra lingvo" . . . . 44	
<i>Erik Axel Karlfeldt</i> (1864—1931)	Virgulino Maria . . . . . 45	
	Ĉieliro de profeto Elija . . . . 47	
	Temp' atenda . . . . . 49	
	Poemo ĉe la soleno de Sveda Akademio en 1929 . . . . . 50	
	Malsano . . . . . 51	
	Nigra Rudolfo . . . . . 54	
	<i>Per Hallström</i> (1866— )	Kanto pri la tero . . . . . 55
	<i>Bo Bergman</i> (1869— )	Adaĝo . . . . . 58
La revuloj . . . . . 59		
Kritiko . . . . . 60		
Nia sorto . . . . . 61		
Nun iras ŝip' . . . . . 62		
Infana kanteto . . . . . 63		
Lilio en Paradizo . . . . . 64		
La lasta stelo . . . . . 66		
<i>Karl Erik Forsslund</i> (1872—1941)		La sorĉito . . . . . 67

	Paĝo
<i>Bertil Gripenberg</i> (1878—1947)	Soleca skispuro ..... 69
<i>Jeanna Oterdahl</i> (1879— )	Preĝo ..... 70
<i>Vilhelm Ekelund</i> (1880—1949)	Tiam estis helaj la fagoj .... 71
	Kvieto ..... 72
	Adoro ..... 73
<i>Sigfrid Siwertz</i> (1882— )	El "Exit Isidoro Filén" .... 74
<i>Anders Österling</i> (1884— )	Evangelio ..... 77
	Monokordo ..... 78
	Pejzaĝo kun steloj ..... 79
<i>Ture Nerman</i> (1886— )	Karinjo ..... 80
<i>Harriet Löwenhielm</i> (1887—1918)	Al la malgranda frat' de mia koro ..... 82
<i>Dan Andersson</i> (1888—1920)	Maristo Jansson ..... 84
<i>Erik Lindorm</i> (1889—1941)	Posttagmeze ..... 85
	Minuto de feliĉo ..... 86
<i>Evert Taube</i> (1890— )	Marista lulkanto ..... 87
<i>Pär Lagerkvist</i> (1891— )	Torso ..... 88
	En la sangano havenon ... . 90
<i>Edit Södergran</i> (1892—1923)	Ni virinoj ..... 91
	Vespero ..... 92
	Sen titolo ..... 93
<i>Erik Blomberg</i> (1894— )	Patrino ..... 94
<i>Hjalmar Gullberg</i> (1898— )	Enciklopedio de l' dioj .... 95
	La ŝalo el Sarajevo ..... 97
	Parolas la disĉiplo plej amata 98
<i>Nils Ferlin</i> (1898— )	Tra muro ..... 99
	Tute egalas al mi ..... 100
	Sen titolo ..... 101
	Rimarkinde ..... 102
	Ludo ..... 103
<i>Hans Botwid</i> (1901— )	Ne tuŝu ĉi tiujn ..... 104
<i>Vera Flygare</i>	Bonvenaluto ..... 105
<i>Aŭtoro nekonata</i>	Lulkanto ..... 108
	Sven el Rozĝarden' (popol- kanto mezepoka) ..... 109
<i>El la Biblio</i>	Eternulo, grace benu ..... 110
	Mi levas la okulojn ..... 111

## ANTAŬVORTOJ DE LA TRADUKINTINO

Kun ĝojo mi kaptas la okazon, ĉi tie esprimi mian plej varman kaj humilan dankon al la Estraro de Eldona Societo Esperanto, Stockholm, kaj ĝia Eksprezidanto, S-ro Bernhard Eriksson, Stockholm, al D-ro John Stenström, Jönköping, kaj Akademiano, D-ro F. Szilágyi, Borås, kiuj per bonvolaj intereso, apogo kaj valoraj konsiloj ebligis la eldonon de ĉi tiu poemkolekto.

Cetere mi deziras aldoni, ke la Leganto nur en kelkaj kazoj, sed ne ĝenerale povas fari konkludojn pri la literatura signifo de la diversaj aŭtoroj laŭ la nombro de iliaj poemoj en ĉi tiu libro. Multaj meritplenaj verkistoj ne estas reprezentitaj, dum enestas kelkaj poemoj de malpli konataj. La elekton de tradukotaj poemoj mi ne faris laŭ ia plano, sed pro inspiraj amo kaj intereso al la koncerna poemo en aktuala horo.

Traduki poezion estas ja delikata afero, kiu tre ofte necesigas doloran kompromison inter la postuloj de enhavo kaj formo. Se ĉi tiuj poemoj en esperanta traduko povus doni iom da dolĉa aŭ akre spica aromo de la originaloj, la libreto eble tamen povus aspiri lokon en la esperanta literaturo.

*Magda Carlsson*

## ENKONDUKO

SVEDA POEMARO! Oni povus skribi nun multe pri la mankoj de la kulturekonomio kaj lingva demokratio, kiam nacia lingvo trudas, aŭ provas trudi sin en la rolon de universala lingvo. Tion oni speciale sentas, kiam temas pri kulturaj gemoj de malgrandaj nacioj. Por vi, kiu legas tiun ĉi libron oni ne devas paroli multe pri la diferenco, kiam *nia lingvo* estas peranto de grandaj kulturvaloroj de ĉiuj literaturoj.

La nomo de Magda Carlsson estas konata ne nur en la Nordo, sed en ĉiuj regionoj, kie oni ŝatas kaj altetaksas nian literaturon. Ŝia neordinara talento vekis atenton jam en la dua, brila periodo de Literatura Mondo. (Tiu periodo komenciĝis en 1931 kaj finiĝis kun la milito.) En tiu altnivela kaj kun manksento rememorata revuo oni vidis ofte la nomon de Magda Carlsson kaj mi bone scias, ke ŝi apartenis al tiuj kunlaborantoj, kiuj ne devis longe atendi la aperon de siaj kontribuaĵoj. Kiam antaŭ iom da tempo aperis la "Evangelia Kantaro", en kiu la leona parto de la tradukoj reprezentis ŝian tradukarton, certe multaj, eĉ recenzistoj, ne donis tiom da atento al tiuj tradukoj, kiom ili vere meritas. Ili ne estis nuraj kantotradukoj kun nenaturaj trudsolvoj de poeziaj kaj prozodiaj problemoj, sed reprezentaj verkoj de granda kaj — ĝuste tial — humila talento. En recenzo mi kuraĝis tiam — kaj certe ne senrajte — paroli pri literatura sensacio. Nun tiu ĉi literatura sensacio eĉ pligraviĝas: en la Sveda Poemaro la multfaceta talento de la tradukistino

brilas eĉ en pli multaj koloroj de ŝia poezia prismo. Magda Carlsson estas pia animo, kiun logas la altaj sferoj de la kredo, sed ŝi ne rifuzas la arton ekster la religia mondo. Ŝi ne vivas nur en la mondo de la psalmoj kaj himnoj; ŝi amas la poezion mem, la arton, kaj konsideras la veran arton sankta, di-benita. Tial ne estas kontraŭdiro, ke la horizonto de la Poemaro estas vasta kaj varia, kaj ke la kapablo de Magda Carlsson solvas kun ne malpli da entuziasmo problemojn, taskojn, kiuj estas longe de la religia kampo. Pensu ekz. pri la virtuoza traduko de "Exit Isidoro Filén", kiun tute hazarde mi ellevis el tiuj multaj, kiujn oni povus menciĝi por pruvi tiun ĉi aserton. Ŝi estas plena de konscio kaj konscienco. Antaŭ ol ŝi tradukas la poemojn, ŝi penetras ĝis ilia kerno. Certe longaj studoj antaŭas la veran laboron. Sed kiam ŝi sentas, ke ŝi estas preta, ŝia arto estas certa, ŝi vivas jam en la poemo, ŝia animo sentas la ritmon de la poema animo, ŝi travivas la tradukotan verkon kaj reverkas ĝin kun suverena arto. Iam mi skribis en recenzo, ke ŝi estas pastrino de la kredo kaj arto; ke ŝi amas kaj majstras nian lingvon. Tion mi volonte ripetis ankaŭ ĉiloke. Ŝi similas al ĝardenistino milda kaj komprenema, kiu amas siajn florojn kaj vidas en ili individuojn.

Kun plezuro mi rekomendas la SVEDA POEMARO-n en la atenton de ĉiu esperantisto, kiun interesas la kulturo, la animo de Svedlando, pri kiu digne atestas tiu ĉi libro.

*D-ro F. Szilágyi, Ak.*



## AMIKON KARAN

Amikon karan mi serĉadi iras.  
De la tagiĝ' mi ĉiam pli sopiras,  
sed lin ne trovis ĝis vespera horo  
la arda koro.

Mi vidas spuron, kie spiko plena  
sin mole klinas, kie flor' ĝardena  
parfumas venton. Eĉ en spiro mia  
la amo lia.

Mi aŭdas lin en la susur' somera,  
arbara himno kaj la flu' rivera.  
Plej dolĉe li en mia kor' parolas  
kaj min konsolas.

Sed ve, lin kaŝas for de mi nebulo,  
atingas preĝo lin, sed ne okulo.  
Ke mi lin vidu, metu koron mian  
sur bruston lian!

Ho, se belegas tiel ĉiu guto  
de l' tera vivo, de l' kreita tuto,  
do kiel bela *fonto* senkompara,  
eterne klara!

## KRISTNASKA MATENO

Saluton, glora frumaten',  
al kies veno, kies ben'  
profetoj nin invitis!  
Ho granda tag',  
mirinda tag',  
en kiu Dia favorag'  
la teron re-vizitis!  
Juno kantas  
    kun maljuno  
    en komuno:  
teraj preĝoj  
al plej granda el la reĝoj.

Li ploros, same kiel ni.

En la mizer' komprenos li,

helpanto senkompara.

Nin donos scion pri Di-vol'

kaj dolĉon mildan de konsol'

por la kalik' amara.

Luktos, larmos

pro doloro,

ke l' homkoro

paci povu,

hejmon malfermitan trovi.

Li venas, nia savo, pac',

ke sun' ekluma de la grac'

neniam plu sin kaŝu.

Paŝtisto nia estos li,

ke liaj restu ĉiam ni

kaj liavoje paŝu.

Kore, fore,

alimonde

beatronde

ni jubilos,

glorigite lin similos.

## EN LA ĈIELIRA TAGO

Al lando de l' eterna glor'  
mi vidas Vin reiri,  
sed mi ankoraŭ kun dolor'  
nur povas ĝin sopiri.  
For de la hejm', sur fremda voj' —  
akompanadas min malĝoj'.

Ho, supre estas nokto for,  
neniam sonas ploro,  
kaj tie, kie la trezor'  
ja estu mia koro.  
Mi ĉiam havu kun fidel'  
mian kunecon en ĉiel'.

Kaj kiel iris, same Vi,  
Jesuo, venos ree.  
Laŭ Via volo vivos mi,  
preĝante kaj obee;  
ne scias horon de l' reven',  
sed Vin atentos ĝis maten'.

Feliĉa estas la servant',  
se tia Vi lin trovos;  
ĉe la reveno, ho Savant',  
Vi lin konduki volos  
al Via Patro laŭ promes' —  
al gloro kaj al senmortec'.

EL "ANĜELO DE L' MORTO".

Vi, Adamidoj, el ter' devenas  
kaj iros reen al sama ter'!

Vi estas miaj, vi apartenas  
post pek' unua al mortsufer'.

El oriento  
mi prenatingas  
al okcidento  
kaj vin estingas.

Di-vorton portas mi de la ter',  
de maro, fajro kaj de l' aer'.

Vi nestojn faras pasersimile.  
En verda bosko de la printemp'  
birdetoj kantis la ĝojon trile  
sub kron' folia en varma temp'.

Sed birdonestoj  
kun vent' batalis,  
kun pluv', tempestoj  
kaj teren falis.

Ne plu revenis pasinta ĝoj' . . .  
Jam trilis ili por lasta foj'.

Por tag' morgaŭa vi maltrankvile,  
kun timo ĝemas kiel kolomb',  
sed sub piedoj, klapokaptile  
por vi malfermas sin via tomb'.

Senlunan horon  
 vi malaperas  
 kaj la memoron  
 la temp' konkeras;  
 novluno vidas el nubargent'  
 alvenon — svenon de nova gent'.

Vi ŝvebas flirte en danc-deliro,  
 en rond' plezura petolas vi,  
 kaj floras mirto kaj sonas liro,  
 sed . . . trans la sojlon enpaŝas mi:  
     mallaŭtas sono  
     ĉe l' dancofino,  
     ekpalas krono  
     kaj fianĉino . . .  
 Malĝojo, Skribo instruis nin,  
 de ĝojo estas la certa fin'.

Mi ĉion regas, ĝis Li estonte,  
 pli forta, venos en fulmobril';  
 profunde ŝakte, ŝvebante monte  
 sibladas mia glacia spir'.  
     La landosarka  
     rastilo pesto  
     kaj la sagarka  
     ekpafa gesto  
 viktimojn trafas. En ĉi batal'  
 ne ŝirmas muroj, nek ŝilda ŝtal'.

Flugilon volvas mi ĉirkaŭ ŝtormon,  
 marondon rulas al ĝia cel',

de l' ŝtatsistemoj frakosas formon . . .  
 elmane falas tiranmartel'.

Por mi jarcentoj  
 nur estas horo,  
 kaj homogentoj  
 kaj homlaboro  
 al mi ondadas el vasta mond',  
 ĝis fine dormos la lasta ond'.

Mansignas mi, kaj vivantoj krie,  
 balae flugas al tiu lok',  
 en kiu nomo ne sonas, kie  
 ne lang' respondas al via vok'.

Mi plezurvagas —  
 renversas tronojn,  
 ensarkofagas  
 Napoleonojn . . .  
 Ĵus potenculo kaj suveren'  
 kaj nun da polvo nur manopren'.

Vi venis — iros. Restado gasta.  
 Vi hejmon havas nur por la nun'.  
 Vi loĝos poste en lok' malvasta,  
 en ĝin ne lumas la brila sun';  
 en ĝia pordo  
 blazon' ekpalas,  
 en ĝia korto  
 la jugo falas;  
 katen', korligo samkiel kan'  
 ŝiriĝas tie pro sama man'.

Do, celojn viajn, mortul', esploru,  
dezirojn pesu kun sankta tim'!

Man', koro puraj al Li fervoru,  
al kiu nudas la homanim'!

Tra tiu pordo

vi ĉiuj lamos,

sur kiu vorto

eterne flamos,

senŝanĝa vorto de Dio: "Ve,

eniras ĉiu, neniŭ re!"

Sed Di' vin amas. Ho, tima tremo,

do trankviliĝu! Esperu, kor'!

El la en teron metita semo

ekĝermos bene rikolta or'.

Ho, kion cedis

vi tre dolore,

ho, kion metis

vi tombon plore,

ne tie restas, ne iĝis nul,

ĉe li ja estas, ĉe Eternul'.

---

(Ĉi tiu poemo gajnis la duan premion en la branĉo "Traduka Poezio" de Belarta Konkurso de Universala Esperanto Asocio, 1954.)



## TIO, KIO ETERNAS

Ja formas fortul' sian mondon per glav',  
 ja flugas lia fam' kiel aglo,  
 sed iam la glavo rompiĝos sen sav'  
 kaj aglo mortfalos pro kuglo.  
 Kion kreas perforto, minacas necert' —  
 ĝi mortas kiel ŝtormo en la dezert'.

Sed vivas la vero. Ĉe glav', gilotin'  
 ĝi staras kun frunto radia.  
 Tra nokta la mondo ĝi gvidas, ĝis fin'  
 montrante al mondo alia.  
 La vero eternas. Tra ter', firmament'  
 ties vortoj resonas de gento al gent'.

La justo eternas. Ne trafos eksterm'  
ĉi piedpremitan lilion.  
Se venkos malbono la mondon ĝis kern',  
konservos vi justokonscion.  
Se ĝin persekutos la ruzo, armil',  
ja restos por ĝi via brusto azil'.

Kaj volo, flamanta en brusta karcer',  
karniĝas por ago subite:  
la just' havas brakon kaj voĉon la ver' —  
popoloj leviĝas ŝanĝite.  
Kaj viaj oferoj kaj via danĝer'  
kiel steloj sin levas el Lethe-river'.

Poezi' ne forflugas kiel flora odor'  
aŭ bunta arkponto ĉiela.  
Se belon vi formas, ĝi ne pasos for,  
ĝin tempo eĉ faros pli bela.  
La belo eternas. Kun arda tener'  
ni kribras ĉi oron el temporiver'.

Por ver': nia amo, por justo: atent'.  
Pri belo kun ĝoj' fantaziu!  
Ĉi trio ne mortos el inter homgent',  
al ili ni apelaciu.  
Kion temp' al vi donis, redonos vi,  
se nestos en vi la eternaj tri.

## HIMNO

Ho, dolĉas la alveno  
al templokort' de Di'!  
Sub lia ŝirma beno  
floradas la lili':  
petaloj de l' fidela  
anim' malfermas sin,  
kaj forton ros' ĉiela  
aspergas super ĝin.

Ho, kiel dolĉe vidi  
fidelajn de Sinjor'  
kun korpureco fidi  
kaj servi kun fervor'!  
Jes, kiam laŭd' Spirite  
sin levas en konkord',  
ho, kiu do hezite  
restadus ekster pord'?

Eniru! Vidu, sentu,  
ke dolĉas la Sinjor';  
en fratkunec' atendu  
kun preĝo kaj ador'!  
Ekstere: vanta rondo  
sen ĝojo por la hom'.  
Ne multe donas mondo —  
trezorojn Dia dom'.

## TAGON NUR, MOMENTON NUR

Tagon nur, momenton nur, mi prenas,  
 kio ajn okazas, jen konsol'.  
 Ĉion ja la Patro mane tenas,  
 ĉu mi timu do por lia vol'?  
 Li, havante por mi patran koron,  
 donas — jen saĝeco trans imag' —  
 ĝojon kaj ripozon kaj doloron  
 ĉiufoje nur por unu tag'.

Mem li akompanas min ĉiame,  
 en aparta temp' kun ties grac'.  
 Mian ŝarĝon Tiu portas ame,  
 kies nomoj estas Fort', Sagac'.  
 Gardi sian karan dum la plago,  
 tiun zorgon metis li sur sin.  
 "Via fort' sufiĉos por la tago",  
 ĉi promeso konsoladas min.

Helpu min do resti kaj kvieti  
 ĉe promesoj viaj, kara Di',  
 ne konsolon de la fid' forĵeti,  
 kiun ĉerpu el la Skribo ni.  
 Helpu, Di', ke ĉiucirkonstance  
 prenu mi el via patra man'  
 tagon nur, momenton, ĝis mi transe  
 vidos ĝoje bonan landon jam.

## SEKURECO

Tiel ne sekuras io,  
kiel infanar' de Dio,  
ne la stel' sur firmamento,  
nek la bird' en nestsilento.

Mem li zorgas pri la bono  
de la siaj en Ciono.  
Li kompatas ja ĉiame,  
brake portas ilin ame.

Ĝoj', mizero venos, iros,  
sed nin ne de li forŝiros.  
El amikoj plej amika  
scias li pri viv' tragika.

Ĝoju, infanaro eta,  
Di' vin gardi estas preta.  
Kiu kontraŭ li batalas,  
senkondiĉe teren falas.

Ĉu li prenas, ĉu li donas,  
Patro tamen same bonas,  
kaj la cel' de lia amo  
estas bono de l' infano.

## TRANKVILAS ĈE JESUA KOR'

Trankvilas ĉe Jesua kor',  
dum sur la ter' tempestas.  
Se foje pezas mia hor',  
li mia paco restas.  
Abismoj muĝas tie ĉi,  
sed trans abismojn portas li.  
Trankvilas ĉe Jesua kor',  
dum sur la ter' tempestas.

Ĉi tere timas la migrant'  
pereon ja survoje.  
Sin miksas ĝem' kun mia kant',  
Jesuo, multafoje.  
Sed ĉe amanta via kor'  
mis-sonoj mondaj mortas for,  
eĉ se minacas al migrant'  
pereo jen survoje.

Kolombo via volas for  
el ĉi dezert' kaj veo.  
Do venu porti ĝin, Sinjor',  
la lacan, al arkeo!  
Sopiras ĝi de l' uragan'  
al ĝoj' sur via dekstra man'.  
Do portu hejmen, ho Sinjor',  
kolombon al arkeo!

## SANKTA VENDREDO

Silento. Venis do la fin'.  
Sufer' kruela lasis lin,  
la moko ne plu dornas.  
En roka tombo post sufer'  
simile ondon en vesper'  
la Kruc-heroo dormas.

Silente, por la lasta foj',  
vizite venis la malĝoj'  
kun mirho, blanka tolo.  
Nun same volas meti mi  
la mirhon de la am' al vi  
en paca vespermolo.

Silentas li en morta mut'.  
Sed malgraŭ nokto, roka krut'  
ne pensas mi pri fuĝo.  
Ne trafos Filon la pere',  
mi scias, li leviĝos je  
la tria matenruĝo.

Silent' atingos ankaŭ min.  
Profunde en la tombosin'  
ripozos mi estonte.  
Sed morto ne timigas plu,  
ĉar mi en fido al Jesu'  
leviĝos, lin renkonte.

## SINJORO, BLOVU VENTOJ DE L' SPIRITO

Sinjoro, blovu ventoj de l' Spirito  
denove inter ni kun forta plen',  
ke la dormantoj el la pek' vekigu  
kaj falu for de ili la katen'!

Ho — ili vidu la preditan hejmon,  
la vojon de la vivo kaj de l' bon',  
purigon trovu de faritaj pekoj:  
la klaran, freŝan fonton de Cion'!

Kaj kiujn vi jam gajnis por la Regno,  
Jesuso, ĉiam gvidu via man',  
ĉar tra dezertoj, tra danĝeraj retoj  
en lando fremda migras la kristan'.

Ho, Lum' de l' mond', radioj viaj brilu,  
ke ni ne palpu en la noktmalplen';  
Nin al la tuta vero paŝe gvidu,  
ĝis estos plena fine la kompren'!



## LA NOKTO

Vi min demandas, kial lum'  
sub mia pord' rubandas.  
En ĉiu nokt', promene, kun  
hezito vi demandas.  
Jen la sekret' de mia kor',  
fabel', de kiu irus  
for la diskreta bonodor',  
se mi al vi ĝin dirus.

Ŝanĝiĝis mia mondkonstru'.  
Jam tiu aĝ' proksimas,  
en kiu ni la homojn plu  
ne amas aŭ estimas.  
Rigardu — jen la lernosum' —  
ne Kainidojn fide!  
Sin al plialto turnas nun  
la koro malrapide.

Novicsimile iras mi  
por iun sekvi ane;  
nun la sekreton scias vi,  
kaj mi ĝin kaŝis vane.  
Sub noktĉiela, frosta lun'  
mi faras al mi diojn  
por fidi, kiam kantas jun'  
la tombomelodiojn.

Sed kiam dormas strato, plac',  
ne venu al la pordo:  
je ĉiu bruo en la pac'  
mutiĝas la divorto.  
La dian voĉon aŭdis mi  
nur en silent', malfrue,  
se kun soleca korokri'  
mi ploris surgenue.

## KIO ESTAS VERO?

Pilato diris: "Kio estas vero?"  
Respondis eĥo — la profeto ne.  
Enigmosolvon post fermitaj lipoj  
al mortoregno portis la hebre'.

Sed, dank' al Dio! Estas profesoroj,  
al kiuj tute klaras jam la ver'!  
Kaj multaj — ili nombras je legio —  
respondis al Pilato pri l' afer'.

Sed ĉu ne strange? De la sola vero  
koloron ŝanĝas jen magi-asperg',  
ĉar kio veras en Berlin' aŭ Jena,  
nur estas stulta ŝerc' en Heidelberg.

## SIGELO DE SALOMONO

Al mi, vi diras, mankas karakter',  
logika rezonpov', bonordaj vivprincipoj,  
neŝancebla kred' kaj la ceter' —  
por tiel diri: spino por la agoripoj.

Rakontos mi sekreton de l' magi',  
misteron pri sigel' de Salomono.  
Legion da spiritoj kaptis li —  
okazis en Damaska regiono  
(aŭ en Jerusalema?) — aŭskultu la fabelon!  
Kaj ĉiun metis li atente en botelon.  
La truojn ŝtopi tuj ordonis li,  
sigelis mem kun zorga energi'.  
Ne venkos brak', atak' al tiu ĉel' spirita —  
jes, ĉel' el bona spec', fortika, altkvalita.

Nun, gesinjoroj, konfidenca dir':  
Vi estas la spiritoj tie en karcero,  
malhelpas korkoj vin ĉe la elir',  
se foje volas vi eksteren — al libero.

En cindron bruli mi preferus mem,  
ol ke botelon oni min enfermus.  
Se Salomono de Jerusalema'  
de sep provincoj la impostojn sternus  
je sia dekstra flank' por tiuj, kiuj kline  
kaj sklave donos sin al malliber' anime,  
— maldekstre la baston' de ĉifonul',  
kaj dirus: "Nun elektu! Jen postu!" —  
bastonon sen hezit' mi prenis, kaj post danko  
fiere irus mi al la maldekstra flanko.

## IDEALISMO KAJ REALISMO

Ektedas min la nuna skism':  
la tero kontraŭ steloj.  
Idealism' aŭ realism'?  
Fendiĝas cerboĉeloj.

Nur portretitan gruzon vi  
belarto konsideras.  
Sed aerhela nubvizi'  
ĉu ne *vizie* veras?

Jes, eĉ en pure ora tas'  
la feĉo — feĉo estas,  
kaj rozoj en fendita vaz'  
ja ĉiam rozoj restas.

## MAJA KANTETO

Printempo . . . Nun birdoj kantas pri nov',  
esperon revekas jubiloj.

Mi ree en pordo — ho, milda blov' —  
sed plore malklaras pupiloj.

Nun mondo ekfloras, nun ŝvebas somer'  
sur kamp' kiel verda lum-ondo.  
Ho, bela la mondo, mia la ter',  
kaj mi estas filo de l' mondo!

Kaj roze brilas la nub' de maten',  
kaj noktaj nebuloj sin levas.  
La mondo juniĝas pro nova ben' —  
singulti en ploro mi devas.

Alvenas tagiĝo tro klare al mi,  
tro freŝas pro roso petalo,  
tro hele vi brilas, blindiga radi':  
tro ĵus mi en ombra mortvalo.

## AL SALEM

Mia koro sopiras el valo  
trans montojn kun nuba tegment'.  
Ho, al Salem, al reĝa tronhalo  
Salomona — kun aglo kaj vent'.

Noktenigra kaj reĝa li estis,  
kun reĝeca kaj milda okul'.  
Kiel grandaj marakvoj majestis  
lia voĉ' en malhela modul'.



Kiel steloj ame enardis  
 de la alto en valon, al vant',  
 tiel li min, sklavinon, rigardis.  
 Ho, jes, tiel rigardas amant'.

Kaj li diris: "Al mia animo,  
 Matenroso, tre plaĉas ja vi,  
 do tuj venu al Salem sen timo  
 kaj vivadu en Salem ĉe mi!"

Kaj li diris: "Lilio en valo,  
 ĉu kuraĝas vi esti kun mi?  
 Inter pompo kaj bril' en tronhalo  
 pli sentiĝas la melankoli'."

"Ĝis piedoj eksangos survoje,  
 sub tagmeza sunbrul', tra la ŝtorm'  
 mi iros, irados korgoje  
 kaj malofte ripozos en dorm'.

Tra dezert', kie rabon disŝiras  
 en kaverno la forta leon',  
 ho, feliĉe kaj dance mi iras —  
 volas esti ĉe vi, Salomon'!"

---

Salem = Jerusalemo.

## ELEKTO — AFLIKTO

Maljunulo kaj vidvo li estas kaj kurba,  
la servistojn li premas. Li knaras, avaras;  
se mi iĝus la lia, mi estus ja turba.  
Kaj fi, avarulo! Kaj fi — vi senharas . . .  
Kaj infanojn li havas, ho ve!  
Edziniĝi al li? Tute ne.

Sed se tamen mi pensas pri korto kaj greno,  
pri la porkoj dikventraj, plenmamaj bovinoj,  
kaj pensas pri ĉiuj penego, ĉagreno,  
kiujn havas pro vestoj kaj ŝuoj virinoj —  
mi cerbumas en mia mizer':  
pripensinda, ĉi tiu afer'.

Al alia, tre vere, mi iam promesis  
 iĝi lia, tuj kiam li venos de l' maro.  
 Ho, rekt dorsa li estis, ĉar riĉo ne pezis.  
 Kia junco floranta, kia bukla hararo . . .  
 Mi lin amus per tuta anim'  
 se mi havus lin en la proksim'.

Sed ne povas mi tamen ne iom pripensi  
 la kaldronojn brilantajn, el kupra metalo  
 — ĉu toleri viraĉon, pri li pacienci?  
 Tre kaduka li estas: vidvina vualo . . .  
 Jes, pri tiom rezigni ja estus domaĝ',  
 vera peko, ridinda malsaĝ'.

Sed pli grandas la peko, min trompe fortiri  
 de amato fidanta, al kiu mi jesis,  
 kvazaŭ ŝtofon tre molan kaj karan disŝiri.  
 Mia kapo turniĝas, haltante forgesis  
 mia kor' sian devon pro li,  
 kaj plorige nun estas al mi . . .

Hm, ĉi tiu kurbulo kun siaj teleroj.  
 Litkusenoj nubŝvelas, plenplenas la ŝrankoj.  
 Ŝatas ludi la pens' per arĝentaj kuleroj,  
 per bovinoj kaj porkoj kaj mono en bankoj.  
 Hm, mi kredas, ke jes . . . Ho, mi kredas, ke jes,  
 eĉ se estus infanoj dek ses!

## NOVJARA KANTETO MEZEPOKA

Staffan al ĉevaloj kvin  
donas trinki en jarfin'.  
Klare jam vesperas.  
Ja ordonis lin Jesu',  
kaj surkorte akvoflu'  
de la Viv' aperas.

Noktomeze al la kort'  
kvin ĉevaloj de la sort'  
el la stalo iras.  
Froste blua ĉielbril'.  
Inter etaj steloj mil  
luntelero brilas.

Jen de Amo junĉeval',  
brila kiel sun' sur val'.  
Festaj bridrimenoj!  
Ĝin ornamas florgirland',  
selon bordas rozorand',  
ligas orfadenoj!

Gaje henas ĉevalin'  
de Feliĉo. Vestas ĝin  
bridoj, hufoj oraj.  
Revas ĝi pri fremda land',  
kie flamas super strand'  
sunoj loge foraj.

Aĉe flava, kun katen'  
pene, trene lamas jen  
la ĉeval' Mizero.  
Kompatinda bestokul'  
lace, tra malsat-nebul'  
serĉas por pajlero.

Apud nuda plorsalik'  
la ĉevalo de Tragik':  
kvara el la kvino.  
Ŝtonrigarde, sub la drap'  
pendas ĝia nigra kap'  
en malĝoja klino.

Laste — besto kun harar'  
griza kiel trena jar'  
de mizera sorto.  
Kiel ĉerkon falas ter'  
premo tuze, sen esper'  
batas huf' de Morto.

Staffan al ĉevaloj kvin  
donas trinki en jarfin'.  
Dolĉas akvo klara.  
Sub ĉiela iluminin'  
Krist' indulga helpu nin  
en la nokt' novjara.

## EN LA JUDA TOMBEJO DE PRAHA

Ne florojn metu, nek rubandojn  
por ostoj, lacaj pro tortur'.  
La vivo donis ne girlandojn,  
sed ŝtonojn. — Ŝtonojn metu nur!

Praavoj same . . . Ilin lasis  
ne kruda man', nek vunda vort',  
dum la jarcentoj ombre pasis  
en ŝlima, judkvartala sort'.

Ho, kie hom' post vago dorna,  
senhejma, peza de dolor'  
ripozas en mortpaco dorma  
post akra moko, multa plor',

ho, tie estus flor' — profano;  
ne moku pacon bela tromp'.  
Ne florojn metu ama mano,  
sed ŝtonojn. Ŝtonojn al la tomb'!

## SONĜO PRI TERO KAJ VENTOJ

(El "Reĝo Salomono kaj Morolf")

Levu ĉielen min, ventoj!  
 Peza sonĝo. La palpebra  
 ŝarĝo estas tro giganta.  
 Salomon' en tol' funebra  
 venis el la vivo vanta.  
 Tero fine ĉion prenas,  
 tere kreskis ĉies ĝermoj.  
 Evidente mi alvenas  
 jam dumvive al la vermoj.  
 Levu ĉielen min, ventoj!

El la mallumo min levu!  
 Svenis fingroj, kiuj ŝutis  
 en la tutsenfundan kribron,  
 vivoligoj sin amputis,  
 perdis mi la ekvilibron.  
 Brilkoloroj okulbataj  
 en morthoro pale nulis,  
 kaj vizaĝoj tre amataj  
 neniigis, fornebulis.  
 El la mallumo min levu!

Portu min, vent', orienten!  
El la sunnebulo flava  
venis la homgenta ĉeno,  
el mia lando \*) Edenrava,  
dezertbrula . . . Sun'! Mateno!  
Tie sin la nokt' spegulas  
en la font' de l' saĝ-trezoro,  
kaj mallumokule brulas  
kre-fervoro, kre-doloro.  
Portu min, vent', orienten!

Portu min, vent', okcidenten!  
Lando de l' sopir'. Susura,  
kun aera nuancriĉo . . .  
Por la hom' haven' sekura,  
hejma paco kaj feliĉo.  
Laŭte sonas, venksignale,  
vortoj, voloĵ, voĉohelo.  
Pri estonto brilas ŝtale  
okulbluo, mar', ĉielo.  
Portu min, vent', okcidenten!

---

\*) La aŭtoro estis de juda deveno.



Montru al mi ree la mondon!

Ho, sopiras mi intense  
al fabelo, kant', liuto . . .

Mi adiaŭ ĉiusense  
dirus al la bela tuto:  
floro, frukt', virina sino,  
de la akvogut' brileto,  
greno en matura klino,  
altaj arboj en kvieto . . .

Montru al mi ree la mondon!

Poste pretigu denove  
por Salomono kameron.  
Al deziroj, revoj, pensoj  
vi aspergu pezan teron.  
Lace dormos miaj sensoj.  
Tero sur la man' dolora,  
ne trovinta pacon en la ĝuo tindra.  
Tero sur okulo plora.  
Tero sur la koro cindra.  
Kovru per tero min, ventoj.

## LA MORTINTOJ

En la malnova ĥorkapel'  
ĉe l' katedralo, kie  
tili' en somermeza bel'  
almuras florfolie,  
ni kuŝas en skulptita griz',  
mi kun la sole kara,  
ĉe kor' la kor', en ŝtona ĉiz' —  
dormeto jam centjara.

Ni amis, ludis, ŝi kaj mi,  
rikoltis grenon pace,  
ĝis iam, marte, sidis ni  
kaj sentis aĝon lace.  
Elfluis el la vitra kav'  
la sablo de montrilo,  
el mia mano falis glav',  
el ŝia la kudrilo.

Ankoraŭ floras en kastel'  
— ho, nestis ni sekure —  
fenestra balzamin'. Prunel',  
sambuko ekstermure.  
Ĉe nia vojo de amsol'  
purpuras la dianto,  
kaj sonas inter la lupol'  
ankoraŭ junaj kantoj.

De l' vivobruo, ĝuo for,  
ĉi tie, kar-intime,  
dormetas ni. Ĉe mia kor'  
la glavo tre proksime.  
Sin klinas al kirasmanik'  
rompita ŝildblazono.  
Ŝi — kun la Skribo sur tunik',  
lilio ĉe la zono.

Ke al Kreinto estu laŭd'  
sub niaj du statuoj  
riveras en ĉizita plaŭd'  
la Paradizaj fluoj.  
Kaj kiel bele el la urn'  
elglitas ili kvare:  
facila tint', ludanta turn',  
trankvile, somerklare.

Sed inter ondoj la radik'  
de Jiŝaj verdas glore,  
terglobon ĝia branĉimplik'  
priombras tre favore.  
Folioj oraj, berfeston':  
homsortoj en granito,  
kaj ĉiam alten sin la kron'  
etendas al zenito.

## EL "LA GEPATRA LINGVO"

Lingvo gepatra, arbsusur'  
ĉiam nova, ŝanĝama,  
kanto suntrila, noktmurmur',  
tamen unu kaj sama.  
Movas foliojn de granda kron'  
vi por komuna muziko.  
Sentas ili je ĉiu ton':  
*unu* la nutra radiko.

De la popolo vivanta spir',  
varma pro peno, espero,  
ĉeno liganta dum longa ir'  
gentojn en ĝojo, sufero.  
Post sia morto batas per vi  
daŭre koroj plej grandaj.  
Aŭdu! Eĥas miloble al ni  
tempoj de longe dormantaj.

Fonto juneca, font' de mister' —  
onde spegulas sin vanto,  
virto, popolkarakter'  
ĉie en sveda lando.  
Lingvo! Ho, umbilika ligil'  
funden al tera sino,  
kant' unua ĉe la lulil',  
lasta spir' en la fino!

## VIRGULINO MARIA

Ŝi venas tie sur herbej' en flu' de bonodor',  
 dalekarlia junulin' kun haŭt' de migdalflor',\*)  
 jes, kiel roz' kaj migdalflor' el iu pura for',  
 en kiu ne pied', nek polv' makulas.  
 Sur kiu vojo migris vi, ke ne brunigis sun'?  
 Maria, kion revis vi interne dum la jun',  
 ke via sang' ne kiel nia brulas?  
 Hararo via lumas de mirinde milda bril',  
 la frunt' similas arkon de la luno,  
 iranta tie super Berg\*\*) kun blanko kaj humil',  
 dum junarabaron trafluetas lumo.

Nun ludas freŝa vespervent' kun la akvilegi'  
 kaj pacan sanktvesperon jen lulsignas la lili',  
 ne venas bleko de kaprid', de la ĉeval' ne kri',  
 ne eta pepo el birdnesto mola.  
 Nun iras en Dalekarli' junul' kun junulin',  
 ja elektita estas vi, kaj ĉiuj volas vin:  
 pri kio do vi pensas tiel sola?  
 Vi iras, kvazaŭ junulin' de l' sankta komuni':  
 ŝi volas en printempa noktsilento  
 maldormi, kaj kun trema kor' mediti volas ŝi  
 pri sankta vort', mistera sakramento.

\*) Migdalfloro oni nomas en Svedujo la vegetaĵon Saxifraga granulata.

\*\*) vilaĝo en Dalekarlio.

Revenu, ho Maria, jam alvenas la vesper',  
 ĉagrenon sentas la patrin', ŝi timos pri danĝer'.  
 Vi eta, delikata — junsaliko ĉe river',  
 arbare paŝas urso sangavida.  
 Anĝel' alportis rozon, kiun tenas vi kun dign',  
 el sankta bedo venis ĝi por esti la insign',  
 ne vundas dornoj, nek serpent' insida.  
 Kaj de la vesperruĝa hejm' la lasta sunradi'  
 jen transas Siljan longe, mire brila —  
 nun povus iri fianĉin' al Paradizo vi  
 sur tiu ponto trema kaj gracila.

### Klarigo pri la supra kaj sekva poemoj.

Por ornami la murojn de siaj ĉambroj, precipe ĉe festaj aranĝoj, la kamparanoj pendigis bildojn pentritajn sur tolo aŭ kartono. La kamparaj pentristoj prenis ĉefe siajn motivojn el bibliaj ilustraĵoj, sed naive translokigis ilin al la hejma pejzaĝo kaj enmetis detalojn el sveda kampara vivo, kio donas tute novan poezian freŝecon al la bildserioj.

Karlfeldt, filo de Dalekarlio, jam de sia infanaĝo lernis ĝuste kompreni kaj ŝati tiun specialan artoformon, kiu inspiris lin al kelkaj plej belaj poemoj. Li sukcesis redoni la naivecon de la religia sento tiel bone, ke la leganto volonte lasas sin kapti de, ekzemple, la grandiozo kaj bonhumoro de *Elija ĉielveturo* kaj la senlime etera personeco de *Virgulino Maria*.

## ĈIELIRO DE PROFETO ELIJA

Jen veturas ja Elija al la regno de l' ĉiel'  
 — nove brilas la kaleŝo tra la blu' —  
 pelto sure, vip' en mano kaj festena la ĉapel',  
 ombrelego sin apogas al genu'.

Digna estas la mieno: ja veturas li de l' val'  
 al plej alta tribunal' en ĉielland'.  
 Lin alvokis la Juĝisto: "Sidu vi en mia hal'  
 kiel mia elektita konsilant'."

Ĵus la veturil' rapidis tra la nuboj kaj aer'  
 kun sciigo de la Reĝo pri ekir'.  
 "Vaste famas via saĝo. Tuj veturu de la ter',  
 mi bezonas vin ĉi supre, brava vir'."

Kaj nun supren la kaleŝo. Trans la veturila rand'  
 larĝa mano salutsignas al la ter'.  
 Sub la radoj kuŝas parto de l' amata Valaland',  
 kiu sonĝas sub mantel' de konifer'.

Jen ekbrilas grandaj lagoj. Kiel borda garnitur'  
 buntvestite floras vigla virinar',  
 kaj knabetoj gapas supren al la stranga nubvetur':  
 "Kien hastas najbaronklo per la ĉar'?"

Jen de Leksand la preĝejo! En la bulbsimila tur'  
 ludas Falu-sonoriloj por solen',\*)  
 kaj veturas la Sanktulo dum ĉi alta uvertur'  
 al muziko de eterna la orgen'.

Kiam sidos vi, Elija, ĉe la tablo apud Li  
 super homa misvagado, tera van',  
 en orelon de l' Juĝisto tre mildige flustru vi,  
 ni malsatas — ho petegu Lin pri pan'!

Suno glitas nun en Siljan\*\*), sed en noktonigra hor'  
 la profeto tamen iras kun trankvil',  
 ĉar amikajn lanternetojn nia bona Di-Sinjur'  
 metis are pro gastamo kaj ĝentil'.

Fore en la spac' dezerta, Hund' ululas tra silent'  
 kaj minace embuskadas la Skorpi',  
 nestas tie Grand-Ursino kaj Leono kaj Serpent',  
 sed sekure la ĉevalojn ŝirmas Di'.

Fajro sub la ĉevalhufo — ŝprucas fajr' el nazotru' —  
 kaj galope ili kuras tra la spac'  
 fine al Stela Vojo, la orarba avenu',  
 kondukanta al la brila Di-palac'.

Al ŝtuparo nun elvenas Lia Dia Grandsinjur':  
 "Bonvenegon; nun eniru do, profet'!"  
 Kaj stalknabo alvokita — jen ruĝvanga pro fervor' —  
 gvidas nun ĉevalojn ŝvitajn al kampet'.

\*) La kupron por la sonoriloj oni elminis en Falun.

\*\*) Granda lago en Dalekarlio.



## TEMP' ATENDA

Temp' atenda, pleje bona,  
tempo ĝerma kaj burĝona,  
ne superas maj' sundrona  
helpromeson de april'.

Iri en arbaro vasta  
sur la vojglacio lasta,  
senti pluvodorojn mil . . .  
Cedus ĝuon de l' somero  
mi por eta fruherbero  
en deklivo ĉe rivero  
kaj l' unua turdotril'.

Temp' atenda, temp' aspira,  
gefianĉa, vivsopira,  
pli ol la printemp' jubila  
ĉarmas amsekret' en kor'.

Renkontiĝi, tuj disiri,  
al danĝera dolĉ' sopiri  
kun timeme trema kor' . . .  
Fruktoj por aliaj oros —  
mi en rev' atendi volos,  
en Eden' maldorma solos  
sub la ekburĝona flor'.

POEMO ĈE LA SOLENO DE LA SVEDA  
AKADEMIO, AŬTUNE, 1929

Peliĝas ŝtormrapide temp'  
samkiel nuboj, fum';  
ekflamon blondan de l' printemp'  
estingas tuj aŭtun'.  
De l' somerflor' —  
nur velka spur',  
sed dankas ni, ho jar',  
se donis vi eĉ rozon nur  
por ĉerko en tombar'.

Psaltero, liro ludu  
dum peza penoprem',  
ĉiame nin apudu  
la amo al poem'.  
Plensonu viv' fulmkura:  
jen vent' herbejsusura,  
jen mar' en ŝtorma trem'.

En hejmintim' satigu nin  
la bona, simpla pan'.  
Amanta sin' konsolu nin  
dum sortouragan'.  
Ĉe vivofin' kred' gvidu nin  
tra mortoocean'.

## MALSANO

Glitvelas mi al fora land'  
al fora land'.  
Lumtur' ekbrilas al mi.  
Popolo tie sur la strand',  
parolas fremde ĝi.

Nun oni min gvidas al granda hal',  
ornamas ĝin ruĝo kaj or'.  
Sed forte siblas la vent' tra portal',  
malvarmas animo kaj kor'.

Ho, kial en nokto malfrua  
nun lasas min ĉiuj en sol'?  
Mi kuŝas en timo skua  
kaj frostas tra ostoj, medol'.

Okuloj lace ektrovas  
kuŝantan sfinkson: jen  
ŝi mole stariĝas . . . sin ŝovas  
katmove al mia kusen'.

\* \* \*

Sin kaŝas en brusto sopiro.  
Sed kio do tiras ĝin?  
Ne verda hejmlando de l' homoj,  
nek lando trans nuba lim'.

Ne logas la vivobruo,  
al tombo ne tiras la em',  
ĝi vagas libere, sengvide:  
sopir' pro sopiro mem.

\* \* \*

Sur tablo jen keiranto,  
kaj blanka azale'.  
Ĉe lit' virina fleganto  
maldormatentas tre.

Memoras mi infanaĝon:  
Morbilo. Lita mol'.  
Vekiĝi, vidi vizaĝon —  
sekuro kaj konsol'.

Nun dormi dolĉe estos,  
ĝis sunos sur la kort',  
Ho, Panjo, vi ja restos.  
Sed — vin ja prenis Mort'?

Ĉiel' nun falas, tremas ter',  
 sed restas firma fort':  
 mi vorton aŭdis de mister'  
 ĉe la mirinda pord'.

Se dronos en bruo sur viva voj'  
 la tono el trans la konsci',  
 mi tamen memoros ĝis dua foj',  
 kiome da amo en ĝi.

\* \* \*

Muzikas elmonte por mi en la sol'  
 plentone, ĉiele. Konsola mol' . . .  
 Nun — voĉo klara, kun dolĉa sordin':  
 Ho, restu, vi kara, ne lasu nin . . .

Okulojn malfermis mi lace, kun pen'.  
 Do hejme. Ne fremda pejzaĝ'.  
 Sonoris ja paskon. Ĉe mia kusen'  
 plortrema infanvizaĝ'.

\* \* \*

Mi rajtas resti kaj restos vole,  
 sed kiom kare mi devas pagi!  
 Al mi vidiĝas, ne plu simbole:  
 jen novaj jaroj por penti, agi.

Mi ne matura, ne inda estis.  
 Sufer' sufiĉis kaj ĝu' ĝisfunda,  
 sed por pretiĝo afero restis:  
 feliĉon krei el kulp' abunda.

## NIGRA RUDOLFO

Kaj Nigra Rudolfo nun dancas  
kapkline kun gaja mien'.  
Li pensas pri noktoj ebriaj  
en la amsterdama haven'.  
Li revas: knabinoj balancas  
florkronojn kaj ŝvebas nun  
la brunaj piedoj graciaj  
sub lumo de Samoa-lun'.

En Roslaga valso flugire,  
reveme li klinas sin.  
Li same en bosko suspire  
brakumis kun ĉilianin',  
kaj tiel la verto krisphara  
sin klinis en negrovilaĝ'  
al eta princin' dektrijara  
kun ebonigra vizaĝ'.

En Málaga dancis li same  
sur vinmakulita marbord'.  
Rozvanga knabino nun tremas,  
logita, venkita, sen fort'.  
Pro dono kaj preno ŝi ĝemas  
brakume de forta la vir'.  
En foro Baltmaro aklame  
respondas per muĝa ekspir'.

## KANTO PRI LA TERO

Maria en Paradizo —  
 ŝi kantis, kaj tenis sin ĉiu ekspir',  
 silentis ravite la gaja ventlud',  
 aŭskultis ĉelipe zefir'.

Maria en Paradizo —  
 ne pasis tie trans sojlon dolor',  
 malpezis kiel la luma aer'  
 pro ĝoj' ĉiu sankta kor'.

Ne venis timo proksimen:  
 revemaj anĝeloj gardis ĉe l' mur'.  
 Kaj fruktoj ruĝis sen tuŝo de man'  
 en pompo de plena matur'.

Maria en Paradizo —  
 la vortoj similis al tinta arĝent',  
 kiam pri hejmo sur fora la ter'  
 ŝi kantis tra la silent':

”Orienten ĝi havis pordon,  
tra kiu flamis matena sun’,  
kaj al okcidento fenestron:  
forpalis tie la lum’;

ĝi havis ujon por fajro,  
la karboj kunfalas ĉe grila son’;  
ĝi havis kuŝejon, sin fermis  
okuloj en dorma dron’;

ĝi havis surkorte salikon;  
printempe ĝin vestis tulo el or’,  
kiu falis aŭtune kiel mantel’,  
revenis maje kun glor’.”

Maria en Paradizo  
mallaŭte finis, rigardis kun varm’.  
Kaj en virgulina, beata la rond’  
ne estis okulo sen larm’.

Verónika flustris mallaŭte:  
”Mi havis fratinon kun rida tril’.”  
Aŭrélia plektis la manojn:  
”Mi havis suferojn mil.”

Revene Margreta memoras:  
”Mi — viron . . . sopire min amis li.”  
Cecília en pala ekstazo:  
”Mi havis sopiron al Di’.”



Kaj kiel skuas la vento  
 el heĝo malseka la gutojn for,  
 nun fluis sur vangojn palajn  
 kun duboj, demandoj, la plor':

"Ĉu la koro ne flamas plej varme  
 sur tero — en ĝojo, mizero, malfort'?  
 Ĉu ne pleje brilas la revo  
 sur fono de nokto kaj mort'?"

Ĉu peko, ke daŭre ligas  
 la koron surtera malbel'?  
 Ĉu ne la ĉielo en nia sopir'  
 pli veris ol tiu ĉiel'?"

Maria alklinis sin ame —  
 la vortoj similis al tinta arĝent',  
 dum lule ŝi kantis pri l' hejmo sur' ter',  
 ke ĉesu ilia lament'.

"Sub noktaj steloj," ŝi kantis,  
 "ankoraŭ oni revas sur ter',  
 kaj floroj svenas aŭtune pro frost',  
 vekigâs en maja aer'."

"Sub noktaj steloj," ŝi kantis,  
 "povas ĉion brakumi mizera kor',  
 kaj aŭdu, kiel belsonas la kord',  
 se ludas ĝin morto, dolor'!"

## ADAĜO

Ond' moviĝas, vent' muzikas,  
ondo, vent' karesas sin.  
Post l' arbaro, ornuance,  
mar' sekala ondbalance  
lulas sin.  
Vi nur mankas; kor' indikas  
tion per malema mov'.  
Min en dormon enmuzikas  
milde mola blov'.

Nuboj naĝas jen ventpele:  
cignoj sur la ĉiellag',  
sed silentas ili glite:  
cignoj kantas nur trafite  
de la sag'.  
Vundis vojo min kruele,  
premas vivotragedi',  
volus gliti mi ventpele  
kun la cign' al vi.

## LA REVULOJ

Malluma la frunt' kaj tranca la ir'.  
La vestoj ĉifone surpendas,  
kaj brakojn ili kun vibra sopir'  
al trompa vizio etendas —  
jes, iras por stelo, por nub' aŭ vent',  
por fulmo, kapric', iluzio  
kaj premas al lipoj je sakrament'  
kalikon kun vin' Fantazio.  
Ne domon, nek grenon — al fremda cel'  
ja logas la fatamorgano.  
Se stelojn donus al ili Ĉiel'  
kaj tutan mondon Satano,  
ne ĉesus ilia soifa brul':  
nur migri, nur serĉi kun reva okul' —  
allogas jam nova incenso.  
Etiĝas ja tuj la solvita demand'.  
La grando troviĝas post tiu rand',  
kie svene haltis la penso.

## KRITIKO

Ĉu estas karnopec', el Brust' ŝirita,  
ĉu vorto eĉ, per larm' aŭ sang' skribita,  
ĉu er', eĉ unu, el la vivo ŝvita  
en tiu ĉi bombasta poezi' —  
troornamita arabesk-ebri'?

Tre bona, certe, la metia lerto,  
sed venu vir', virino — ne nur sperto —  
kaj korp', animo en la vortriveron!  
Ne vort' pro vort'. Nur tio povas mem  
eniĝi unge koron kaj radike teron,  
en kio kuŝas vere viva sem'.

## NIA SORTO

Ni flagras cente —  
sekfoliaro  
pelita vente —  
al nia celo,  
al tombobaro.  
En ruĝfabelo  
ni vivas reve;  
moviĝas deve,  
traflugas meve  
la maronokton,  
kun vent' batalas.  
Levitaj vente  
ni ree falas  
kaj eksilente  
eniras nokton.

## NUN IRAS ŜIP'

Nun iras ŝip' balance al cel',  
ho dance al cel', plenplenas la vel'.  
Mi flustras ion al via orel' —  
la ŝipa nom': Feliĉo.

Teruraj ondegaj frapas kun bru',  
jen blankas rifdorsoj en nigra blu',  
ŝipestro tamen direktas plu,  
ĉar nom' de l' ŝip': Feliĉo.

Se ili venas al verda la strand',  
ho, verda la strand', kun roza ruband'  
knabin' tie staras, mansignas de l' rand'  
al ŝip' kun nom' Feliĉo.

Hoj-hojas responde de l' mastoj, ŝnurar',  
huraas gajuloj sur blua mar',  
kaj . . . jen maristo kun bukloj, ĉar  
la ŝipa nom': Feliĉo.

Kaj buŝo ruĝa malfermas nun sin,  
malfermas nun sin la buŝ' de knabin',  
ŝi ĝemas, petegas: kunprenu min  
surŝipe de Feliĉo!

Sed kredu al mi, kun ĉi pasaĝer'  
la ŝipo pereos; kredu al ver':  
knabinoj sur mar', knabinoj sur ter'  
danĝeras al Feliĉo.

## INFANA KANTETO

Koko krias ĉe la stal',  
ĉe la stal'.  
Krakas fajr' kamena,  
tremas la foli' en val',  
verda valo, eta val'.  
Blovas vent' matena.

Jen hirundo en seren',  
en seren'.  
Blankas nub' en supro.  
Al diserva frukunven'  
bingas-bongas, frukunven'.  
Nun vekigis pupo!

Bonan, pup'! Vin klinu re,  
klinu re,  
laŭte ridu, Anjo!  
Ludas viv' mallonge tre,  
pupo gaja kaj mi tre,  
gajas pleje Panjo.

## LILIO EN PARADIZO

Sur aĉa strat' en kvartalo Cupido  
en rond' de maristoj kaj ĝu-aĉet'  
kaj multe, kion ni lasu el vido,  
loĝadis ŝi do, Matilda Magnet'.

Ne tute bonorde ŝi vivis sur tero:  
kun pastro, polico en malharmoni',  
sed nun estas pura la flor' de l' mizero —  
en Paradizo brilblanka lili'.

La pekoj nur estis fulga makulo  
sur vitro anima, lavita per plor',  
kaj en la kor' estis ĉambro, angulo  
kun multaj aĵoj de alta valor'.

Eĉ eta knabino loĝis ja tie,  
perdinta neniam el sia memor'  
la ravan vekigon matensunstrie  
ĉe Patro kaj Panjo. Jen: kafodor'



ĉelite. Katido! Lumridaj tagoj;  
anasoj babilis sur suna strand',  
kaj en la ĝardeno logis de fragoj,  
fabele, tre dolĉa kaj ruĝa land'.

Kaj spite al aĉaj, malindaj faroj  
la festa ĉambro brilegis de pur',  
al truda scivolo de l' gastoj, najbaroj  
ŝlosita per ege forta serur'.

Nur foje, en nokta mallum', okazis  
dum akre doloris dorna memor',  
ke l' pordo malfermis sin mem kaj lasis  
samsortulinon al la trezor'.

Sed kiam ŝi kuŝis, ĉifono kota,  
mortant' kompatinda, Matilda Magnet',  
sin ĉio malfermis: al voj' irota  
elfluis lumo el la ĉambret'.

Kaj venis bela anĝel'; ĝi portis  
triumfe la etan knabinon al Di'.  
Kaj oni al tombo en ĉerko transportis  
l' alian, kio ne estis ŝi.

## LA LASTA STELO

Nuboj fermas mole  
pordon de l' ĉiel'.  
Tra la vitro sole  
lumas unu stel'.

Baldaŭ Di' estingos  
ankaŭ tiun for.  
Nokto min atingos,  
pezas mia kor'.

## LA SORĈITO

(Laŭ malnova fabelo el Dalekarlio)

Ŝi, Rangila en Roberg,  
 al tiu hom' nur montras sin  
 al kiu ne fermiĝis la okulo.  
 Sed Limbo-Erik ŝin renkontis.  
 Ŝi diris: "Venu ami min!"  
 Abiaj branĉoj vestis ŝin —  
 ho, sentu nur ilian bonodoron!  
 Sub fruktoj en purpura brulo  
 duonvidiĝis blanke delikataj  
 la ŝultro, brusto, koks' en loga lulo.  
 Plej bela el driadoj tim-amataj  
 ŝi estis ja, ŝi, Rangila,  
 ho, Rangila en Roberg!

Li sekvis ŝin en monton,  
 kaj multajn jarojn restis li  
 sed foje venis hejmen pro malsato,  
 malsato . . . kaj petegis:  
 "Nun, patro, sonorigu vi  
 en la preĝejo ĵaŭdojn tri  
 vespere ke ricevu mi liberon!"

Sed vanas sanktaj sonoj. Sen kompato  
 lin logas tonoj el la sorĉa monto.  
 Pli forta ol orgenmurmur',  
 pli milda ol folisusur'

incitas liajn sensojn voĉo dolĉa;  
 lin ravas pli ol birdotril',  
 ol la plej juna verdo de printempo.  
 Ho, Rangila, ho, Rangila!  
 Ŝi flustras, vokas . . . varma sang',  
 lilia brusto, rozovang' . . .  
 Ho, Rangila en Roberg!

Denove en la monton.  
 Dum multaj jaroj restis li,  
 sed venis ree hejmen pro malsato.  
 Li diris al amiko:  
 "Ĉu vidas tiun lumon vi  
 ĉe Rangila en Roberg?  
 Palacon, kie brilas fajre-ore  
 tra cent fenestroj flama lum'?  
 Ĉu aŭdas ludon, kanton?" Kaj fervore  
 li pentras ĉiun riĉon de la ter'.  
 L' amiko miras, Kie ĉi mister'?  
 Li ja nenion vidas, krom nigraj nubobuloj  
 kaj mont', arbar', kovritaj de nebuloj.  
 La kapon dube skuas la amik'.  
 Jen Erik falas al la tero bruna.  
 Lin mortan oni peze portas nun  
 en domon de la patro, la maljuna.  
 Eksonas voĉo rava. Kante  
 foriĝas ĝi en monton kaj forondas,  
 mallaŭte jubilante:  
 "Ho vi, ho vi! Vi, Rangila,  
 ho Rangila en Roberg!"

---

(Prezentita kun muzikakompano ĉe U. K. en Stockholm, 1934.)

## SOLECA SKISPURO

Skispur', kiu serĉas, sola  
 por voj' al arbarprofund',  
 sinua skispuro mola  
 trans montojn al valofund',  
 sur marĉ', kie kirle muĝas  
 neĝvento kaj kriplas pin' —  
 jen mia penso. Ĝi fuĝas  
 solece al malproksim'.

Skispuro frosta forbluas  
 solece en la dezert' —  
 homvivo, kiu forfluas  
 sur vojo de la necert'.  
 Demandojn mi portis bruste,  
 en foro sin kaŝis respond' —  
 zigzaga spur' neĝokruste:  
 jen mia vagad' tra mond'.

Skispuro sola. Ĝin finas  
 subite roka ekmut',  
 kie kripla pino sin klinas  
 trans randon de l' nigra krut'.  
 Kiel froste la steloj falas,  
 kiel ombras la arbomur',  
 kiel neĝo malpeze kristalas  
 sur mole kovrita spur'!

## PREĜO

Ho, vi, kiu vidas, ho vi, kiu scias,  
ke ĉiuanime sekreto vekrias,  
vi ankaŭ en mi la abismojn ja vidas.  
Ĉemane min prenu, danĝero insidas!  
Plenigu per graco l' animon senkernan,  
per fajro forigu skorion internan  
kaj lasu min veni en landon eternan,  
Patro kaj Dio!

Se estas la vojo al transa la korto  
nur voj' tra turmento, doloro kaj morto,  
mi ĝoje ĝin iru. Vi fleksu la volon  
kaj donu al laca animo konsolon.  
Al mi donis "estu" animan esencon,  
por vivo surtera decidis vi sencon.  
En mi ĝin enskribu — vi havas potencon,  
Patro kaj Dio!

## TIAM ESTIS HELAJ LA FAGOJ

Tiam estis helaj la fagoj, tiam la rivero lumis  
de naĝanta insularo: blankaj ranunkuloj;  
hele la paduso balancis sian kronon ĉi tie,  
kie etulo mi vivis.

Nun silente pluvas. La ĉielo pendas malalte  
sur nudaj arboj. Ekfajfas. Denove la trajno moviĝas.  
En la nokton malrapide nigriĝantan mi foriras  
senamika.

## KVIETO

La tago suferpeza  
jam venis al la cel';  
sub nuboj plumbe peza  
frostklaras la ĉiel'.

Trankvilu, pensoj, mio;  
kor-kri', sufoku vin!  
Tre baldaŭ dormos ĉio,  
tre baldaŭ venos fin'.





## EL "EXIT ISIDORO FILÉN"

Nun temas pri la sentoj kaj pensoj de Leonardo Isidoro Filén en la vespero antaŭ ol li konfesis siajn ŝtelojn el la kaso kaj provizo. Filén estis belega viro kun nigra, krispa hararo, pala haŭto, mallumaj, dolĉaj okuloj, nekontraŭstareble kurbaj lipoj kaj longaj, malseketaj manoj, pro la longa uzado de tranĉilo kaj tondilo ofte vigle kaj gracie svingiĝantaj. La virinoj fariĝis lia malfeliĉo. Li oferis al ili ĉion. La virinoj scias pri Isidoro Filén pli ol mi. Sed ili silentas — same kiel la ŝtelhelpantoj.

La lasta fojo, kiam oni vidis Filén en la libera aero, estis ĉe la ĉiusomera balo de la frizista societo en Nacka. Li staris jam tiam, pala kaj rigida, en la ŝetombro de la sorto, sed ankaŭ tia, en sia prema malsereno, li ne povis eviti, fari profundan impreson al la belaj frizistinoj. Ŝajnis kvazaŭ li farus malgajan kaj solenan finkalkulon pri ĉiuj siaj eksamantinoj. Ĉar Filén ĉiam fidele elektis el sia metio, kio ankaŭ, ĉe okazo, estis akcentata kiel iom senkulpiga trajto . . .

Kaj li do subite foriris en la nokton por reaperi nur en la tribunalaj gazetnotoj. Antaŭ la juĝisto li estis trankvila kaj humila. Ne tro severe prijuĝu lin.

Alna glu', pinpingla fal'.

Zumas jen barbirobal'.

Ĉe piedoj tikla sent' —

ĉu vin venkos valsotent'?

Kornorkestra tonohajl' —

kurbus pro ĝi fera najl'!

Tubo, korno kaj tambur',  
*Crème Ninon* kaj *Rose d' amour*,  
solv' safrana, ambro, mosk'!  
Dancu gaje en la bosk'!  
Kosmetika la parfum'  
ŝvebas en la lunolum'.  
Migdalsap', "lilia lakt' ",  
pinarbaro kaj valstakt'.  
Falsharaĵo, bukligil',  
brust' ĉe brusto — maltrankvil'.  
Krispaj haroj de virin'  
tiklas dolĉe-svene vin,  
kaj en arda sangoflu' —  
muta rev' en kirla glu' . . .  
Ĉu, piedo kaj pasi',  
kontraŭstari povas vi?  
Korn' volupta, amoscen':  
nun endancu, ho Filén!

Por tiu plu en ter-oaz'  
ne floros rozo, revo,  
kiun tentadis tro la kas'  
de lia bona ĉefo.  
Vi bela Isidor' Filén,  
vi ŝtelis — ho skandalo —  
botelon ŝtelis vi sen ĝen'  
da *Eau de Portugal*o.

Ho, kiel grilo grincas: iiii . . .  
ĉe akrigila sono  
senkulpa iam gajis mi  
en la razadsalono.  
Jes, pentu — jam ne eblas fuĝ':  
tondilmakzeloj de la juĝ'  
oscedas kun malpleno  
por via vivfadeno.

— — —

Jen, frato, eĥo de la ĥor'  
la gajajn voĉojn portas!  
Sub ombraj arboj en la for'  
la lasta valso mortas:  
. . . Mosk', safrano, rozparfum',  
se vi povas, gaju nun!  
Mankateno, piedĉen' . . .  
Ĉu vin tentas valsrefren'?  
Samfadene koroj sep  
amis vin kun kvera pep'.  
Kis', mensogo, malhonest',  
man' en jupo, man' en kest'.  
La fadenon ŝiris dram',  
koroj sep forgesis jam.  
Mutu kornoj, nigru scen . . .  
Exit Isidor' Filén.

---

Exit = eliras. (Sceninstrukcio por aktoro.)

## EVANGELIO

Se longe eĉ la font' de via memo  
en dorm' atendis, ne ĝlacias tremo  
de l' verda viv'. Vekiĝas post dormpezo  
solene ni al suno kaj tagmezo.

Tra ekvinoksaj tempoj grizebluaj  
la homo iras dum bataloj bruaj,  
sed foje, ĝoje sentas li la movon,  
de l' marŝo homa freŝan preterblovon.

Feliĉa, kiu vidas, ke komuna  
kun multaj estas lia sort fratkuna,  
kaj sur vizaĝoj legas sulkfigurojn,  
deĉifras de la fruntoj sortgravurojn.

Nur vivo donas vivon: diro proza,  
tre simpla, kaj — sekreto serioza.  
Ke ĝia ver' validas por eterne,  
ja multaj scias nur post vunda lerno.

Por memkompato, kiu sin priploras,  
evangelio, unu nur, aŭroras;  
el la cerbum' post egoisma baro  
nur unu elirpord': al la homaro!

## . MONOKORDO

Kampulo nun ludas sur monokord'  
ĉe l' forno. Nun foras mizero,  
kaj Líbanon, Salem kaj Ora la Pord'  
belbrilas en griza vespero.

Li palpas krudfingre sur sola kord',  
dum ruĝe ardetas la karboj.  
Kviete enfluas en himnon akord'  
de l' marĉoj aŭtunaj kaj arboj.

Ĉu grace el Sferoj alturnas Sinjor'  
la orelon al tia mallerto?  
Laŭdkanto en simpla vest' de labor',  
por mond' ne tre bela koncerto.

Li kantas — aĝul' kun modesta rol'  
sur tero. Sed se la Zorganto  
en tempo malpia suferas pro sol',  
lin eble ĝojigas la kanto?

Etaĵon grandigas senfina distanc' —  
dum lia kordludo mallerta  
la tero ne estas nur pilko en danc',  
ŝvebante en spaco dezerta.

## PEJZAĜO KUN STELOJ

Malfrusomera nokt' fajrigas briliantojn;  
ripozas tero en magia lac'.

Jen falis ĵus en blujn la Atlantojn  
svenigajn — stelo el senfina spac'.

Sed sub la steloj duonlumo tuŝas  
tegmenton etan. En la ombra dens'  
birdnestoj kaj knabinalkovoj kuŝas,  
kaj tien rajtas fuĝi mia pens'.

Mi tiun supron mia propra nomas,  
punkteto firma ĉe senlima trans',  
kaj miajn paŝojn konas, kiuj domas  
post tiu pord' kun la amika ans'.  
Se fremda iras mi sub noktaj sunoj,  
sur ter' troviĝas jen por mi azil'  
ĉe maro, kiu ondas al la dunoj  
kaj kortsalikoj kanton pri trankvil'.

## KARINJO

Eta, gracila, nur dekkvin,  
 la haroj — lin'.  
 Kaj supre blu-bluas ĉielomuslin'.  
 Sekvante vin  
 sin gimnazioj balancas;  
 glacio degelas en vintrofin'  
 kaj dekdu ventoj dancas.

Sed trista, kun jaroj tridek-tri  
 ĉeflanke mi,  
 la faŭno malbela, ne pensas pli  
 al melankoli',  
 pro juna ir', linharoj . . .  
 forgesas, ke homoj ridetus pri  
 la tri kaj tridek jaroj.

Ne timu do! Ne, etulin'!  
 Rigardu min!  
 Ne plue okazos tia krim':  
 vidserĉi vin;  
 nur kiam, plenkreska, iame  
 sen ĝeno vi scios pri vira inklin',  
 kiel ĝi fajras flame.



Por mi: matura florĝarden'.  
 Ne mankas jen  
 la formoj kaj flirto kaj ĉirkaŭpren'  
 por volvi min en  
 mantelon de ruĝa ebrio.  
 Por gimnazian': via flora liptrem'  
 en iu ŝtupar' en junio.

Do, iru en rosfreŝa jun'  
 sub marta sun'  
 — de knabokruroj la trenum' —  
 surstrate kun  
 esper', Feliĉon trovi.  
 L' okulojn fermos la Maljun'  
 obee. (Kiel povi?)

Mi ĝemos . . . ne vidos, tute ne:  
 memoros, ke  
 vi estu por mi kiel blua fe',  
 poezi', rimkre',  
 kantet' el senkulp' kaj harlino,  
 infanbalmelodi', kiu premas ĉe  
 la gorgo kun ĝena obstino . . .

Kaj tiel, dum pasos kun susur'  
 la tempokur'  
 kaj vi maturiĝos por rabo, tortur',  
 mi staras nur  
 fenestre je martaj gutsonoj  
 kaj dankas ridlarne al la saĝa natur'  
 pro ĉiam novaj burĝonoj.

AL LA MALGRANDA FRAT'  
DE MIA KORO

Al la malgranda frat' de mia koro  
donaci volus mi el trezorkest'  
juvelon brilan pli ol Koh-i-nooro.  
Mi volus pli —  
sed atestvokas Dion,  
ke mi nenion havas, ve, nenion,  
sed pri feliĉ' de l' frato preĝos mi.

Surmeti volas mi pilgrimmantelon,  
 kaj post senfine longa pilgrimad'  
 mi genutrenos min en templohelon,  
 sur la marmor'  
 min klinos ĉealtare,  
 kaj petos mi senĉese, humilkare,  
 ĝis "Tiel estu!" diros Di-Sinjo'.

Mi frunton premos teren kaj infane  
 petegos: "Di-Sinjoro, Cebaot'!  
 Vi, kiu tenas ĉiun ĝojon mane,  
 vin petas mi:  
 el via riĉo gemon multfacetan  
 el ĝoj' senlima donu, ho, al li!

— feliĉon tian, ke ĝi, eĉ sentate  
 momenton nur, lin savu ĝis kapturn',  
 sed ne permesu, ke ĝi velku sate!  
 Mi petas vin:  
 Donacu senmezure!  
 Sed, Dio, kiam regos li purpure,  
 ho faru, ke li ne forgesu min . . .

## MARISTO JANSON

Hejo ho, maristo Janson, jam fortiĝas matenvento,  
lasta nokto forruliĝis, nun Konstanca iros do.  
Se patrinon vi brakumis, kisis Stinjon kun lamento,  
se eltrinkis vi la brandon, kantu hejo ho!

Hejo ho, maristo Janson, ĉu vi timas en ĉi horo,  
ke l' knabino vin trompados kaj forlasos en malĝoj'?  
Kiel matenstelo tremas, tiel batas via koro;  
turnu al la vent' la nazon, kantu hejo hoj!

Hejo ho, maristo Janson, eble estos via sorto  
ne virinoj, sed la ŝarkoj en la sudomara blu'!  
Eble inter la koraloj embuskadas tie Morto,  
la krudmana sed honesta, kantu hejo hu!

Eble sidos vi, maljuna, sur farmej' en Alabama,  
dum kribriĝas sur tempiojn griza polv' de l' vivovoj'.  
Eble vi forgesos Stinjon pro glaset' en Jokohama —  
jes, ne virte, sed tre home, kantu hejo hoj!

## POSTTAGMEZO

Fajro krakas. Ekster la dom'  
aŭtuna pluvo faladas.  
El kuirejo susura son':  
lia edzino gladas.

Pordbato, bruo, tondro, fulm'!  
L' infanoj ĉambron lavangas,  
neniu muta, nek sen pulm'  
kaj neniu el ili mankas.

Sed pasas la tago al dorma vesper',  
kaj forne cindro grizblankas.  
Kaj post nelonge ne estos ver':  
"neniu mankas."

## MINUTO DE FELIÇO

Ĉu ver', ke infanon mi premas al kor',  
min mem rekonas en ĝi,  
ke ter' estas varma, fajreras marfor',  
ĉielo serenas sen stri'?

Kiu tempo nun estas? Kaj kiu la jar'?  
Kiu estas mi mem, mia nom'?  
Vi ridanta vindaĵo kun blonda harar',  
kiel venis al mia brakum'?

Mi vivas! Mi vivas! La ter' je dispon'!  
De kie min portis la vent'?  
Mi eble atendis dum jarmilion'  
por tiu ĉi sola moment'.

## MARISTA LULKANTO

Lul — lal — lul', la kaldrono sur brul',  
 alvenas tri migrantoj survoje,  
 unua, ve, lamul',  
 la dua, ho, blindul',  
 la tria ne povas paroli.

Lul — lal — lul', la kaldrono sur brul',  
 ĉiele migradas tri steloj,  
 unua blankas jen,  
 la dua ruĝas jes,  
 la tria estas luno, la flava.

Lul — lal — lul', la kaldrono sur brul',  
 blovadas tri ventoj surmare,  
 sur Granda Ocean',  
 sur eta Skagerak'  
 kaj longe for en golfo Botnia.

Lul — lal — lul', la kaldrono sur brul',  
 veladas tri ŝipoj suronde,  
 unua estas bark',  
 la dua estas brig',  
 la tria havas velojn ĉifonajn.

Lul — lal — lul', la kaldrono sur brul',  
 ŝipkest' havas tri figuretojn,  
 unua estas kred'  
 kaj dua la esper',  
 la tria estas amo, la tre ruĝa.

## TORSO

Nur vi nun restas, Brust',  
vi suferpova,  
vi, kiu sentas sen lament'  
dolorprofundon.  
Polv' — mia buŝ',  
sur fremda ter' mutanta,  
la gorgo: polv' —  
ne povas plu ĝi krei.  
Kaj miaj membroj, ve,  
rompите, splite kuŝas  
por ĉies piedprem'.



Ne levas sin la man'  
por kapti vantanojn,  
saluti sunon de la tago  
aŭ preni venko-laŭron.  
Ne levas sin la frunto  
por kun vireca penso  
renkonti sian sorton.  
Okulo ne malfermiĝas  
por mondon klare vidi  
kaj trovi la certecon.

Nur mia brusto, nur vi . . .  
L' animon vi katenas,  
stumpitan por sufero.  
Nur vi, ho, brusto —  
birdnesto de la vivo,  
tremanta  
ankoraŭ longe, longe  
post forflugo de la birdo.  
Nur vi, ho brusto,  
dolorprofundo,  
estas indulgita.

EN LA SANGAN HAVENON  
DE MIA KOR'

En la sangan havenon de mia kor'  
nun fremda ŝipo englitas  
kun helaj veloj. El kiu for'?'  
Kaj kiu vi estas? Silente vi glitas  
en min. Enigas la ankron profunden.  
Atendas trankvile  
ĉi-nokte  
en maldormo ĉe la sanga rodo.

Neniu salutas vin. Mortas la vent'  
en pende malplena velo.  
Ne movas la ondoj en la silent'  
vian bildon sur sanga malhelo.

De kie vi venas?

Mi atendas de la vasta maro ŝipon  
kun blankaj veloj.  
Ne vin.

Ĝi venus tie el la lumo  
kun flagrubandoj feste flirtantaj,  
ĝia velo estus plena de suno  
kaj ĝi englitis ĉi tien —

Kiu vi estas?  
Kial kuŝi tiel peze,  
tiel preme sur la sanganta rodo?

## NI VIRINOJ

Ni virinoj vivas tiel proksime al la bruna tero.  
Ni demandas la kukolon, kion donos la printempo,  
ni brakumas la nudan pinon,  
ni esploras ĉe la sunsubiro pri aŭguroj, konsiloj.  
Iam viron mi amis, li al nenio kredis . . .  
En frosta tago li venis kun senanimaj okuloj;  
en peza tago li foriris kun forgesemo sur la frunto.  
Se mia infano ne vivas, ĝi lia estas . . .

## VESPERO

Venas vespero malvarma.

Sorbu el mia mano la varmon,  
mia mano havas sangon printempan.

Mian manon prenu, mian brakon blankan,  
prenu la sopiron de miaj junaj ŝultroj.

Senti, senti nur unu nokton,  
en nokto kia la nuna,  
vian pezan kapon sur mia brusto . . .

## SEN TITOLO

Degelis kiel neĝo aerkasteloj miaj,  
forfluis kiel akvo la revoj.  
El ĉio, kion amis mi,  
ĉielo restas nur  
kun kelkaj palaj steloj.

\*

Floron vi serĉis, trovis frukton,  
fonton vi serĉis, trovis maron,  
virinon vi serĉis, trovis animon.  
Malkontenta vi estas.

\*

Via amo vian stelon estingas —  
en mia vivo luno ekbrilas.  
Mia mano ne hejmas en via.  
Via mano: libido.  
Mia mano: sopiro.

## PATRINO

Ripozas vi de l' taglabor'  
nun en krepuskbalzamoj.  
De lakt' varmeta kaj lipmol'  
odoras viaj mamoj.

Silentas hejm'. Ridetas vi  
dum vesperhor' trankvilas.  
Vi klinas nukon — ĉirkaŭ ĝi  
lumringo milde brilas.

Jen hejmo — for de harpozum'  
kaj sankta orrivero,  
sed de la lampo nimbas lum'  
patrinon sur la tero.

## ENCIKLOPEDIO DE DIOJ

*Amor* (greklingve Eros), amdio. Malpermesato.  
Foje vidita hazarde en iu kristana fistrato.

*Balder*, dio germana, pioniro de l' paca trankvilo.  
Prapacifisto. Kondamno: tre longa ekzilo.

*Ceres* nun spertas, ke grenon ni brule oferas,  
dum la senpanaj najbaroj malsaton suferas.

*Demos*, di' de l' popol', nenaskita pro manko de forto,  
generita de Marx; post jarcento mortinta (aborto).

*Eternaj* dioj sub G, H kaj N sin antaŭe trovis;  
dioj fuĝintaj, ĉar ilin kateni ni provis.

Fortaj fulmdioj kaj Ĝojo-diinoj —  
ilin forpelis tiranoj kaj prudaj virinoj.

Inri, surkruca skrib' de Golgota.  
Jesus el Názaret, Reĝo de l' judoj (sub J retrovota).

Jesus, la di' krucumita, kun tuta la gento  
malpermesita en nia dudeka jarcento.

Kristus (signifas: sanktoleita je reĝo).  
"Ilin pardonu, ĉar ili ne scias . . ." — jen lia preĝo.

Multaj migrantaj gedioj troviĝis sub L, R, S, T.  
Dia aero nomiĝas libero. La dioj nun fuĝas nin do.

Pallas Athene, la Inteligento, Racio,  
jam, pro ordono, transiris al nekonata nacio.

Quo vadis? (Kien vi iras?) Al di' oni faris demandon.  
"Al la ĉiel'. Oni diris: 'Forlasu la landon!'"

Venus, la ŝaŭmo-devena, nun vivas en granda mizero.  
Ŝin pormorala polic' hejmensendis de l' tero.

Xerxes la maron per skurĝoj forte batfendis,  
ĉar de mardioj la greka libero dependis.

Zeus onidire forestas. La dioj potencaj la homojn  
fuĝis, post unu alia. Neniu memoras la nomojn.



## LA ŜALO EL SARAJEVO

Cervoj, leonoj sur bed' de lili'  
rondiras kun digna krurlevo  
inter literoj de Arabi'  
sur ŝalo el Sarajevo.

Tiaj ne estas la ŝtofoj de l'  
teksistoj el ĉi regiono:  
laŭ okcidenta, popola model'  
disŝirus la cervon leono.

Ŝalon aĉetis la skandinav',  
ke ĉesu vendist-oracio.  
Ŝalo surlita — jen mia elsav',  
spitado al biologio,

de orientaj sanktuloj vizi'  
sur krucoj sub dornokronoj:  
land', kie ludas kun ŝafo besti'  
kaj dancas la cerv' kun leonoj.

PAROLAS LA DISĈIPLO  
PLEJ AMATA

Ĉi manojn vidu, kiuj la kalikon  
al niaj lipoj metis, rompis panojn!  
Por vundoj kaj doloroj — resanigon.  
Ĉe lia kruco laŭdas mi ĉi manojn.

Por beni taŭgis ili kaj donaci,  
ne por defendi aŭ perforte preni.  
Vespere, kiam li komencis laci,  
en miajn buklojn ili emis veni.

## TRA MURO

Kalkulu ĝis mil — aŭ ĝis milo kaj du  
aŭ nur unu kaj mil, sinjor' Johanson'!  
Aŭ englutu disketon da bromo. Ĉu  
ne helpus al vi, sinjor' Johanson'?

Sed kiom da bru' — ĉu vi estas aktor'?  
Tragedi' aŭ fars', sinjor' Johanson?  
Eble estas kompleks'. Aŭ dentodolor'.  
Aŭ ĉe estas *l' anim'*, sinjor' Johanson'?

La animo nur, do. Ho, bonŝance nur ĝi,  
nur apendicet', sinjor' Johanson'!  
Ĝin detondas ni tuj, kaj poste al vi  
venos bona ekdorm', sinjor' Johanson'.

## TUTE EGALAS AL MI

Kiam la kapo vaporas,  
 Mezulo Sved' estas *vir'* —  
 ne tiel diable tedega  
 kiel kun sobra elspir'.

Li povas eĉ ĝui kanteton,  
 legadon de iu strof',  
 kaj ofte dum nokta hejmkrozo  
 ŝanĝiĝas je filozof',

ekstaras, kun kruroj dise,  
 por malseklipa rezon'  
 kaj Onklon de Luno salutas  
 per arĝentokapa baston':

"Jen, frato, la steloj dancas  
 kiel muŝoj en la eter' . . .  
 . . . jes, *stelo*, ĉu ne, kaj *okulo*  
 estas tamen mirinda afer' . . .

. . . jes, Di' mia, se oni pensas . . ."  
 Ne plue atingas li,  
 nur tien eĉ Salomono,  
 kaj — tute egalas al mi.

SEN TITOLO

Solvita mondenigmo! En la scienca lum'  
vaporas for la timo kaj doloro.

Etiĝis la distanco de dom' al domo, dum  
longiĝis tiu inter kor' kaj koro.

## RIMARKINDE

Kiam Habel iame sur virga ter'  
kun ĝemplenda ekkri'  
apud sia ofer'  
mortfalis al ter',  
parolis al Kain Di'  
en koler' . . .

Sed Kain respondis: "Ĉu mi estas gardanto de mia frato?"  
Estas rimarkinde, ke en la mondhistorio neniam  
troviĝis pli ĝenerale memorita repliko ol ĉi tiu.  
Tiu de Kain.

## LUDO

Esi ke, desi ke! Luda scen'.  
Vivo kalkulas kaj Anderson jen  
bruste sentas puŝegon — kuŝ' . . .  
Esi ke, desi ke, pif, paf, puŝ' —  
Peterson svene aspektas.  
Esi ke, desi ke, for la glor'.  
Esi ke, desi ke, Lundström for!  
Sian vicon neniŭ suspektas.  
Ekster la rond' paciencie sinjor'  
Morto rastante kolektas.

## NE TUŜU ĈI TIUJN

Malĝojo,  
vi povas eduki  
la virojn de la kruela rido.  
Malĝojo,  
vi povas mildigi la virinojn de la akra rigardo.  
Malĝojo,  
vi povas purigi,  
hardi,  
nobligi, sed —  
ne tuŝu ĉi tiujn!  
Ilin vi rompus  
aŭ, se ne,  
ili malmoliĝus,  
kaj sur korojn,  
kies sentoj floris printempobluj,  
glacilumo palus.  
Tera malĝojo  
iru al tiuj,  
kiuj sin hardis  
per tera ĝojo.



(En 1936 Vera Flygare verkis la jenan bonvensaluton de la Sveda Trafik-Asocio al internacia kongreso en Stockholm. La kongresaranĝantoj petis tradukon ankaŭ en Esperanto.)

## BONVENSALUTO

Ŝipoj mare vojon plugas  
tra nebul' aŭ suna klar',  
kaj aeroplanoj flugas  
super ŝtorma Baltomar'.  
Jen la celo: nia flora,  
betulverda, sveda strand'.  
Nun, fremdul' el lando fora,  
bonvenigas vin Svedland':

seriozaj arbaregoj,  
 flava greno, laga blu',  
 montoj kun glaciaj tegoj,  
 insuletoj, riverflu',  
 Ostrogotaj la ebenoj,  
 nordĉiela aŭreol',  
 de Sörmland' nobelbienoj  
 kaj noktsuna, sorĉa mol'.

Visby: rozoj kaj ruinoj,  
 mezepoko kaj memor',  
 en Snäckgård-banej' senfinoj  
 da salfreŝo kaj sunor'.  
 Gösta Berling-valo olda,  
 Vermland, hejm' de romantik'!  
 Jen Nils Holgerson, kobolda —  
 pionir' de flugtrafik'!

Stockholm! Melarlag-Reĝino!  
 Songe rava fejuvel'!  
 Revas en ondlula sino  
 la Palac' sub luna hel'.  
 Pardonkisas glor' praava  
 domojn de la rektlini'  
 kaj kiel en temp' Gustava  
 flirtas Haga papili'.

Sur Skaniebena granda  
fluas lakto kaj miel';  
kaŝas sin en ter' Nordlanda  
ruĝa oro de l' fabel'.  
Kaj ankoraŭ ĉe la sonoj  
de l' martel', en fumvual'  
fandas filoj de valonoj  
ercon por la sveda ŝtal'.

En la ŝaum' torenta saltas  
salmoj kun arĝenta bril',  
blanka vel' fiere altas  
kontraŭ ruĝa sunsubir'.  
Fojnodoro, somersuno!  
Violona melodi' . . .  
Aerklaro de l' autuno,  
vigla sporto sur glaci'.

Mejlojn fulmrapiĝe glutas  
trajnoj per elektra ir' —  
ripoziga vin salutas  
tamen lando de trankvil'.  
Ho, fremdul' el lando fora,  
por adiaŭ ĉe la strand'  
estu la donaco flora:  
la memoroj el Svedland'.

## LULKANTO

Dormu, kara mia kor'!  
Jam la stelo brilas.  
Nokto sonĝas en la for',  
lun' malkreske iras.  
Bird' en sia varma nest'  
dormas en kvieto,  
same en la mola vest'  
dormu infaneto.

Via tuta, longa tag'  
plenis de ludkuro.  
Nun la elfoj de la lag'  
dancas je konkuro.  
Dormu, mia korolum',  
en la nokt' silenta!  
Baldaŭ ridos ree sun'  
sur river' argenta.

## SVEN EL ROZĜARDEN'

Kie estis vi tiom longe,  
ho, Sven el Rozĝarden'?  
— En la stalo mi estis,  
nia patrinet'!  
Atendu malfrue . . . neniam.

De kie la sang' sur ĉemizo,  
ho, Sven el Rozĝarden'?  
— Mi mortigis la fraton,  
nia patrinet'.  
Atendu malfrue . . . neniam.

Kaj kiel vi vin elsavos,  
ho, Sven el Rozĝarden'?  
— Mi forlasos la landon,  
nia patrinet'.  
Atendu malfrue . . . neniam.

Eternulo, grace benu  
kaj nin ĉiujn gardu nun!  
Kontraŭ ni vizaĝon tenu,  
ke surfluu nin la lum'!  
Turnu vin al ni kun grac',  
venu en la koron pac'!  
Laŭdu danke mi, savito,  
vin, ho Patro, Fil', Spirito!

Nombroj 6: 24—26

Mi levas la okulojn  
preĝante, al la mont',  
al Li, la Eternulo,  
potenca la helpont'.  
Ke mi ne piedglitu,  
atentas la rigard',  
ĉar ne dormetas, kiu  
sin nomas mia gard'.

De Izrael' ŝirmanto,  
neniam dormas li;  
ĉe mia dekstra flanko  
la ombron formas li.  
De sun' li ŝirmas tage  
kaj nokte de la lun',  
elire kaj enire,  
eterne kiel nun.

Psalmo 121.

*Vortoj, ne troveblaj en la PLENA VORTARO kaj*  
*ĝia SUPLEMENTO*

bestio = sovaĝbesto

sinuo = serpentumado, kurbzigzagaro

tragika = tragedieca